

Raporto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI por 2012

Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: Mar 31, 2013.

Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

_____ X sama kiel pasintjare

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

_____ / _____ X sama kiel pasintjare

Jura statuso:

_____ X sama kiel pasintjare

Se la sekcio havas juran registriĝon, bv. doni la lokon, instancon kaj daton de tiu registriĝo.

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

_____ X sama kiel pasintjare

Ekz.: ĉu integra parto, en kunlaboraj rilatoj aŭ plene sendependa de ĝi?

Membro-nombro fine de 2012:

Sume: ____90____. Detale: paperaj ____81____, retaj __9____, aliaj (HM,DM) _____.

Bv. informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.

6 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrokotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 90 membrojn.

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2013:

____4____. Per aparta deklaro vi nomumu ilin!

(kalkulu laŭ membronombro fine de 2012: 5-14: **1**; 15-34: **2**, 35-49: **3**, pli ol 50: **4**.)

Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:

Oficiala hejmpaĝo: <http://esperanto.de/agei>

Oficiala ret-adreso: zsofia.korody@esperanto.de

Ĉe la retadreso bv. diri al kiu funkciulo ĝi indikas. Se vi havas retejon,

kiu prizorgas ĝin: *Zsófia Kóródy*

kiomofte vi ĝisdatigas ĝin: *laŭ bezono, se estas gravaj novaĵoj aŭ gravaj ŝanĝoj*

kiujn planojn vi havas ampleksigi ĝin?

Se ne, ĉu vi planas lanĉi retejon? Ĉu vi farus tion, se vi havus teknikan helpon de aŭ pere de ILEI?

Ĉu via sekcio havas retgrupon: ____jes____

Se jes, ĉu vi pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝojn al viaj membroj? *ne*

Se ne, kiel vi plusendas al viaj membroj mesaĝojn de ILEI? *prezidanto de AGEI, Zsófia Korody plusendas mesaĝojn al la listo*

Revuo sekcia:

_____ X sama kiel pasintjare

Se via sekcio eldonas fizike presatan aŭ retan bultenon, bv. doni ĝian nomon, redaktoron, retadreson, oftecon kaj amplekson.

Enlanda membrotizo:

_____25 EUR, pro la altigita ILEI-kotizo ekde 2012 restas 5 EUR/membro por landa agado Se la enlanda kotizo estas pli ol la internacia, bv. indiki kiun parton vi retenas por landa agado.

Nuna estraro de la sekcio:

_____ X sama kiel pasintjare

Laŭeble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn.

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:

_____ X sama kiel pasintjare

=== **Agado** ===

6 ĝis 10 linioj da klarigoj bonvenas; ligoj al pli longaj raportoj bonvenas.

AGEI estas komunutila asocio, agadas por interkompreniĝo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia interŝanĝo de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankaŭ laŭ internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizaĵoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.

AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.

Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo por gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Propraj aranĝoj dum 2012:

Dusemajna intensa trejnkurso dum julio 2012 enkadre de UEA/ILEI jubilea agado Esperanto 125. Okazis lingva kaj faka klerigado laŭ modula sistemo por lingva perfektigo kaj akiro de faka kompetento pri gramatiko, Esperanto-literaturo, historio, kulturo, movadaj konoj.

Torpedo-8, Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia: pedagogiaj tagoj por klerigado, faka pluklerigado, spertinterŝanĝo inter gekolegoj okazis inter septembro 28-oktobro 3 2012) (samtempe 56a studsesio) okazis en Herzberg am Harz, organizata de AGEI (landa sekcio de ILEI) kaj Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg <http://esperanto-urbo.de>.

Ĝi traktis 2 ĉeftemojn:

1. la rolo de artoj en motivado, instruado. Kiel ni uzu desegnadon, pentraĵojn, muzikon, kantojn, teatrajn ludojn dum la lecionoj? Kiel ni instigu lingvolernadon per arto, artaĵoj?

Temogvidantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

2. internaciaj, ekstermovadaj projektoj, subvenciebloj. Springboard kaj Comenius-projektoj, projekto PUNTO (partnerurba kunlaboro). Temogvidanto: Zsófia Kóródy

Ni havis ankaŭ forumon pri edukaj-movadaj temoj kaj el la ICH-biblioteko aparte okupiĝis pri sciencaj revuoj kaj komparado de lernolibroj, lernmaterialoj.

Okazis ankaŭ kunsido por organizi la 46an ILEI-konferencon en somero 2013 en Germanio.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Dum la 64a IFEF-kongreso en Herzberg am Harz en majo 2012 en Herzberg am Harz okazis ILEI-seminario gvidata de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI.

Dum la Germana Esperanto-Kongreso en majo 2012 en Berlin AGEI havis sian jarĉefkunvenon, kiun ĉeestis ankaŭ Stefan MacGill. Temis ankaŭ pri preparlaboroj por organizi la 46an ILEI-konferencon en Herzberg/Sieber. Krom tio multaj membroj partoprenis en la prelego de Zsófia Kóródy, AGEI-prezidanto kaj Peter Zilvar de Interkultura Centro Herzberg. En formo de prelegoj kaj laborgrupo estis prezentitaj sukcesaj ĝemelurbaj agadoj kaj EU-projektoj. Sukcesa internacia kunlaborado de lernejoj, instruistoj kaj plenkreskuloj, kontaktoj kun alilanda amikaro, rezultodona trejnado, instrukapabligado, engaĝo de la generacio 55+. Personaj spertoj, travivaĵoj, interŝanĝo de ideoj, diskutado pri projektproponoj, planoj.

En februaro dum MES en Francio, poste en aprilo 2012 reprezentanto (prezidanto) de AGEI, Zsófia Kóródy gvidis lingvokursojn en Gresillon kaj en Bydgoszcz.

Propraj projektoj dum 2012:

Preparlaboro por organizi en 2013 agnoskitan klerigsemajnon, lingvolernadon (Bildingsurlaubswowe) kadre de popola altlernejo (KVHS) en Osterode. Ellaboro de alvokteksto kaj detala priskribo de la enhavo. La kurso ne realiĝis kiel oficiala KVHS-kurso pro ne sufiĉaj partoprenantoj, sed okazis sukcese en Interkultura Centro Herzberg.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Partopreno de Gymnasium Winterberg en Comenius-Projekto kun lernejoj en Polski Trambesh (Bulgario, gvidanto), Gherla (Rumanio), Lucca (Italio) kaj Mazeikiai (Litovio). La unua laborrenkontiĝo okazis dum novembro 2012 en Polski Trambesh, Bulgario.

Ellaboro de Comenius-projekto far Interkultura Centro Herzberg kun partneroj el Germanio, Italio kaj Hungario. Ni ricevis aprobon, do la kunlaboro kun tiuj lernejoj (EMA gimnazio en Herzberg, mezlernejo G. Grassa en Mazara del Vallo kaj faka mezlernejo M. Pálffy en Győr) komenciĝis en septembro 2012 kaj daŭros dum 2 jaroj.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Bona varbado estas la anoncoj pri Esperanto-kursoj en la programkajeroj de Popolaltlernejoj (VHS). Tiuj atingas dek-, eĉ centmilojn da legantoj, familiojn, vastan publikon. Eĉ se poste ne realiĝos kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, la legantoj povas legi pri Esperanto kaj ekscii pri kursofertoj.

Varbado Esperantlingva kaj germanlingva okazas per la gazeto de GEA Esperanto aktuell, tra naciaj kaj internaciaj dissendolistoj, per retpaĝoj, Facebook kaj alvokoj por membriĝo

okazadas ekz. dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj aranĝataj en Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg <http://ic-herzberg.de>.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

AGEI regule kunlaboras pere de pluraj siaj instruistoj kun popolaltlernejoj. Sukcesa ekzemplo estis en 2012 la organizado de feriotempa studsemajno, kiu estas agnoskita de la Edukministerio kaj por kiu la partoprenantoj povas ricevi pagitan feriotempon de siaj laborlokoj. La lernado okazis en du grupoj: por komencantoj kaj progresemoj.

En kelkaj urboj okazadis alvokoj per regionaj popolaltlernejoj, kiuj anoncas lingvokursojn, inter ili ankaŭ Esperantan. AGEI per sia hejmpaĝo <http://esperanto.de/agei> ofertas helpon al gekolegoj, disponigas modeltekstojn por tiaj alvokoj.

Konata E-instruado en via teritorio:

Vidu liston de lernejoj (bazaj kaj mezgradaj) kaj universitatoj ĉe edukado.net. Lerneja instruado okazis en Herzberg am Harz, Erfurt, Winterberg, Ahrensburg, Korbach, Kassel, Buxtehude.

Granda sukceso en universitatnivela edukado estas la lernogrupoj en Universitato Emden, kie en ĉiu semestro dekoj da studentoj konatiĝas kun Esperanto kaj pluraj el ili elektas ankaŭ la sekvasemestran daŭrigan fazon.

Ankaŭ en Münster kaj Stuttgart regule okazas universitataj Esperanto-kursoj.

Aliaj atingoj en 2012

Grava tasko dum 2012 estis la komencita organizado, administrado de la 46a ILEI-konferenco, prepero de informilo, aliĝilo, kreo kaj enhava riĉigo de la konferenca retpaĝaro <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>

Bona atingo en 2012 estis la regula informado de nia membraro, kaj la restanta membronombro de nia asocio.

.../ILEI/Sekcioj/OLS11 enketila modelo.doc

Aneksa: Konsiloj por plenskribado.

Konsiloj por plenskribado de la enketilo:

Ni antaŭdankas pro via kunlaboro raporti al ni. Ni memorigas vin, ke ĉiujara raportado estas laŭstatuta devo de ĉiu sekcio!

Ni starigas demandojn, por ke ni arigu bazajn informojn. Se tiuj ne ŝanĝiĝis kompare kun 2009 aŭ 2010, nur hoku la keston, por ne reskribi ĉion. La raporto el 2010 konsulteblas en nia ILEI-retejo www.ilei.info sub "Instancoj/Sekcioj". La sugestoj pri raporto-longo estas nur proponoj, skribu tiom multe aŭ malmulte, kiom vi povas aŭ volas. Se iu demando ne validas por via sekcio, lasu ĝin sen respondo.

Ni promesas, ke viaj respondoj, post redaktado estos publikigitaj rete, ne nur por la komitato kaj membraro, sed por ĉiu, kiu interesiĝas.

La lokoj markitaj per linio _____ estas la lokoj kie vi entajpu viajn respondojn.

Bonvolu sendi la dosieron, en formato rtf aŭ doc au PDF, al la sekretario kaj prezidanto:

ilei.sekretario@gmail.com
stefan.macgill@gmail.com

La temlinio de via mesaĝo kun la alkroĉita dosiero komencu per "LS11" kun aldono de via landnomo.

Bv. ne ŝanĝi la litertipon aŭ grandon. La litertipo estas Tahoma je 12pt, kio estas unikod-konforma, do kapablas trakti la Esperantajn supersignojn.

Tahoma estas vaste uzata; se vi ne ne havas ĝin, petu ĝin de ni, aŭ uzu Arial. Se vi ial ne kapablas krei unikodajn supersignitajn literojn, bv. uzi "x" post la koncerna litero – ne uzu malunikodajn `solvojn`.

Ni celas per tio kiel eble plej aŭtomatigi la pretigon de la raporto, kaj kalkulas je via helpo – ILEI ja ne havas centran oficejon!

Ni sendas la enketilon en formato PDF. Tio estas ĉefe por ke vi kontrolu la aspekton de la dokumento en RTF. Verŝajne al vi malfacilos plenskribi la PDF dosieron.

Antaŭdanke:

HUANG Yinbao (Trezoro), sekretario de ILEI
Stefan MacGill, prezidanto de ILEI

PS: Ni ne petas nun vian plej freŝajn deklarojn pri la membroj en 2012, tion ni traktos per aparta mesaĝo. Tio tamen devos okazi baldaŭ, por ke viaj novaj membroj ricevu IPR 2012/1 senprokraste. Ĝis marto 31, 2012 la membroj devas esti deklaritaj kaj pagitaj!).

PPS: Bonvolu memori, ke la ĉiujara raportado estas Statuta devo de ĉiu sekcio!